

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni prezentis al vi la ĵus eldonitan verkon de Ivo Lapenna : *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*.

A.- Hodiaŭ por instigi vin aĉeti kaj legi tiun libron ni citos parton de parolado, kiun eldiris Ivo Lapenna en la malferma kunsido de la 35-a Universala Kongreso okazinta en Parizo en 1950.

Cl.- En tiu parolado Ivo Lapenna montris, kio diferencigas la mondojn esperantan kaj neesperantan. La homaro marŝadas al sia unueco, kaj esperanto ludas gravan rolon en tiu marŝado al universalismo.

A.- La eron, kiun ni citos, estas teksto inda eniri antologion pri nia homaranismo. Ĝia titolo povus esti : *La idea signifo de esperanto*. Aŭdu la dirojn de Ivo Lapenna pri tiu idea signifo de nia lingvo :

Cl.- « *La ideo pri Internacia Lingvo estas esprimo de la universalismaj tendencoj.*

A.- *La realigo de tiu ideo en formo de nia Esperanto estas la plej konkreta, preskaŭ fizike palpebla manifestiĝo de tiu celado al tuthomeco.*

Cl.- *Sed, samtempe, ĝi estas ankaŭ la plej forta apogilo, la plej potenca antaŭeniganto de tiu sama universalismo, kiu ĝin kreis.*

A.- *La lingvo – tute egale kiu, la lingvo ĝenerale – estas socia fenomeno, kiu troviĝas en funkcia rilato kun la bazo, el kiu ĝi elkreskis.*

Cl.- *La lingvo ebligas ne nur la pensadon kaj la reciprokan komunikadon de ideoj, sed ĝi ankaŭ kreas certan senton de komuneco inter la personoj, kiuj ĝin uzas.*

A.- *Naskita de la socio, ĝi mem cementigas la socion, ŝirmante ĝin de disfalo.*

Cl.- *Tute same : la Internacia Lingvo ne estas sole teknika rimedo de pensado, nek pura peranto de pensointerŝanĝoj en internaciaj kadroj.*

A.- *Ĝi havas ankaŭ profundan idean signifon.*

Cl.- *Same kiel la naciaj lingvoj ludis kaj ludas unu el la ĉefaj roloj en la formiĝo de la nacioj, same tiel la Internacia Lingvo – neŭtrala, supernacia – formas kaj stimulas la tuthoman, universalan solidarecon.*

A.- *La uzado mem de la samaj vortoj proksimigas la homojn.*

Cl.- *Eĉ se Esperanto limiĝus nur al tio, ĝia rolo estus granda.*

A.- *Sed la Internacia Lingvo, ebligante rektajn, senperajn kontaktojn tra la tuta mondo, klare evidencigas la esencan samecon de la homa naturo.*

Cl.- *Multnombraj sciencaj verkoj estas skribitaj pri tiu temo.*

A.- *Diversaj religioj proklamis la principon kiel unu el fundamentoj de la respektiva religia koncepto.*

Cl.- *La filozofio pridiskutis la demandon ĉiuflanke.*

A.- *Multe kaj ofte oni parolas pri ĝi.*

Cl.- *Tamen nur ni, la uzantoj de la Internacia Lingvo, ne nur parolas pri tuthomara solidareco, ne nur mense ĝin komprenas, sed ankaŭ sentas ĝin.*

A.- Ni konkrete sentas, ke ĉiuj homoj – sen ia ajn konsidero al la diferencoj, naciaj, lingvaj aŭ religiaj – estas kaj devas esti egalaj en sia kvalito de homoj.

Cl.- Tial ni ankaŭ sentas, ke devas malaperi ĉiu ajn formo de subpremado aŭ de superregado, bazitaj sur rasa, nacia, lingva aŭ religia apartenoj.

A.- Mallonge, ni profunde sentas la veran universalismon, kies konsistigaj partoj estas egaleco de ĉiuj homoj, spirita libereco, socia justeco kaj interpopola paco.

Cl.- Tiun ĉi vere revolucion ŝanĝigon en la pensomaniero kaj sentado, kiujn kreas la Internacia Lingvo; tiun ĉi transformigon de mallarĝe nacia koncepto al universale homa konceptado, kaŭzitan de la Internacia Lingvo, komprenis same bone, aŭ eĉ pli bone, la malamikoj de universalismo, ol ĝiaj adeptoj, ol, kelkfoje, eĉ la esperantistoj mem !

A.- Ne estas hazardo, geamikoj, ke ĉiuj tiranecaj kaj despotecaj reĝimoj levis sin kontraŭ Esperanto, malpermesis la lingvon, persekutis la esperantistojn !

Cl.- Se Esperanto estus ia infanludilo, se pere de ĝi oni ne povus interkompreniĝi, se ĝi havus nenian idean signifon, kredis al mi, ke ili grandskale propagandus ĝin.

A.- Sed ĉar la Internacia Lingvo havas grandegan spiritan forton, ĉar ĝi troviĝas ĉepinte de universalismo kaj tuthomeco, ĝi estis kaj estas atakata de ĉiaspekaj ŝovinistoj.

Cl.- Tiuj atakoj ne devas nin timigi nek senkuraĝigi.

A.- Kontraŭe, ni fieru pri ili !

Cl.- Ni fieru, se tiraneco nin kontraŭstaras, ĉar tiraneco ĉiam kontraŭstaras noblecon kaj veran progreson.

A.- Tiuj atakoj konvinku nin ankoraŭ pli firme pri la praveco, vereco kaj grandeco de nia afero.

Cl.- Ni konsciu, ke la spirito estas nevenkebla krom se ĝi mem rezignas pri defendo kaj rezisto !

A.- La ideon oni povas nek enkateni, nek aresti, nek mortigi !

Cl.- Ĝuste tial jam okazis, kaj ankoraŭ okazos, ke vastaj imperioj malaperis, ke iam tremigaj diktatoroj kaj aŭtokratoj falis, sed nia Esperanto restis, vivas kaj prosperas, altrudiĝante ĉiam pli impete al la vekiganta konscienco de la homaro.

A.- Kun la nepra venkado de universalismo venkas ankaŭ Esperanto.

Cl.- Kun venkado de Esperanto la vera, sincera universalismo akiras novajn poziciojn.

A.- Pri tio ni ĉiuj estu profunde konsciaj ! »

Cl.- Tiu longa kaj pensoriĉa citado el la verko *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj* de Ivo Lapenna instigu vin legi tiun ĵus eldonitan libron.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-